# Kriterioj por pritaksado de test-tekstoj

| KRITERIO | B1 | B2 | C1 |
|---|---|---|---|
| **Lingva kompleksec o** | Simplaj kaj kunmetitaj frazoj; malmulta subordigo | Varia frazostrukturo kun regula subordigo | Kompleksaj, enmetitaj strukturoj, stilaj variantoj |
| **Leksiko** | Oftaj radikoj, travideblaj derivaĵoj | Vasta vortprovizo, ankaŭ abstrakta | Riĉa, nuancita, idiomoj kaj metaforoj |
| **Impliciteco de informo** | Plejparte eksplicita | Parte implicita, necesas inferenco | Ofte implicita, subtilaj signifoj |
| **Teksta longo en vortoj** | Mallonga–mezlonga<br>Skr: 450-600<br>Aŭda: 300-450 | Mezlonga<br>Skr: 550-700<br>Aŭda: 450-600 | Mezlonga–longa<br>Skr: 650-850 –<br>Aŭda: 600-750 |
| **Strukturo kaj kohereco** | Tre klara, lineara | Klara kun flankaj ideoj | Kompleksa, argumenta organizo |
| **Temo** | Ĉiutaga, konata, nefaka | Sociaj kaj ĝeneralaj temoj | Abstraktaj aŭ teoriaj temoj |
| **Internacia neŭtraleco** | Plene neŭtrala | Plejparte neŭtrala | Povas enhavi klarigeblajn referencojn |
| **Apero de E-o-temo** | Biografioj, simplaj rakontoj, faktoj | E-movado, aranĝoj, recenzoj | Interlingvistiko, skoloj, ideologio, diskutoj |
| **Taskebleco** | Ĉefideo kaj faktoj | Aldone inferenco kaj sinteno | Kritika kompreno kaj intenco |
| **Koherigaj rimedoj** | Bazaj konektiloj | Vasta gamo de ligiloj | Kompleksaj diskursaj markiloj |
| **Faka scio** | Neniu bezonata | Minimuma | Limigita, kun klarigo |
| **Ĝenro** | Personaj tekstoj, anoncoj, simplaj informoj | Artikoloj, intervjuoj, raportoj | Eseoj, analizoj, komentarioj |

- **Psikometria taŭgeco**: bone diferencigu, ne estu solvebla hazarde, donu fidindajn rezultojn
- **Etika taŭgeco:** sen diskriminacio, ne estu ŝoka
- **Praktika uzebleco:** facila reprodukteblo (aŭtoraj rajtoj, grafika klareco.)